Gmail Paulo Pires <flugfolio.xyz@gmail.com>

# ESPERANTO NOTÍCIAS

1 mensagem

**esperanto@easp.org.br** <esperanto@easp.org.br> 22 de abril de 2026 às 13:10
Para: Esperanto <esperanto@easp.org.br>

## INFORMATIVO DA ASSOCIAÇÃO PAULISTA DE ESPERANTO

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

http://easp.org.br – Redação: Paulo S.Viana

**22 de abril 2026**

### ÁUSTRIA RECONHECE O ESPERANTO COMO LÍNGUA DE CULTURA E PATRIMÔNIO IMATERIAL



A Comissão Austríaca da Unesco formalmente reconheceu o Esperanto como patrimônio imaterial do país. O anúncio foi publicado em 16 de abril de 2026, poucos meses antes do 111º Congresso Mundial de Esperanto que vai acontecer na cidade de Graz. Também a Polônia (em 2014) e a Croácia (em 2019) já formalizaram a mesma decisão.

Segundo Seán Ó Riain, responsável pelo departamento de relações exteriores da Associação Universal de Esperanto, esse reconhecimento vem reforçar de modo decisivo a demonstração do conteúdo cultural da Língua Internacional e do movimento que a promove no mundo. Não se trata apenas de um código linguístico, mas de um acervo de literatura original e traduzida, intensa atividade virtual e presencial e, principalmente, um ideal de confraternização e respeito entre todos os povos.

### *AŬSTRUJO AGNOSKAS ESPERANTON KIEL LINGVON DE KULTURO KAJ NEMATERIA HEREDAĴO*

*La Aŭstra Komisiono de Unesko formale rekonis Esperanton kiel nematerian heredaĵon de tiu lando. La anonco estis publikigita je la 16-a de aprilo 2026, kelkajn monatojn antaŭ la 111-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en la urbo Graz. Ankaŭ Pollando (2014) kaj Kroatujo (2019) jam formaligis la saman decidon.*

*Laŭ Seán Ó Riain, estrarano pri Eksteraj Rilatoj de Universala Esperanto-Asocio, tia rekono grave plifortigas la elmontron pri la kultura enhavo de la Internacia Lingvo kaj de la movado, kiu ĝin praktikas. Ne temas nur pri lingvokodo, sed de trezoro de literaturo originala kaj tradukita, intensa virtuala kaj ĉeesta agado, kaj precipe idealo de kunfratiĝo kaj respekto inter ĉiuj popoloj.*

***APROXIMA-SE O ENCONTRO VIRTUAL DA JUVENTUDE ESPERANTISTA***




*O "RETOSO", encontro virtual da Juventude Esperantista Mundial, em sua edição 2026, está próximo. De 8 a 10 de maio, será possível participar do já tradicional evento em que jovens Esperantistas do mundo todo se encontram para palestras, oficinas, salas de conversa e outras atividades. Embora organizado por jovens, para jovens, podem participar praticantes da Língua Internacional de qualquer idade. A iniciativa teve início no ano de 2021, quando da epidemia de covid. No link abaixo é possível inscrever-se e até propor atividades no encontro:*

*https://www.tejo.org/retoso-2026/*

*A palavra "RETOSO" é uma espécie de trocadilho com duas outras palavras em Esperanto: "ret- " (rede) e "etoso" (ambiente).*

***ALPROKSIMIĜAS LA VIRTUALA RENKONTIĜO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO***

*"RETOSO", la virtuala renkontiĝo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, en la eldono 2026, estas proksima. De la 8-a ĝis la 10-a de majo, estos eble partopreni en la jam tradicia evento, en kiu junaj Esperantistoj el la tuta mondo renkontiĝas por prelegoj, atelieroj, babilrondoj kaj aliaj agadoj. Kvankam ĝi estas organizata de junuloj por junuloj, povas partopreni ĉiuaĝaj praktikantoj de la Internacia Lingvo. Tiu iniciato komenciĝis en la jaro 2021, okaze de la pandemio de Kovim-19. Per la ĉi-suba ligilo estas eble enskribiĝi kaj eĉ proponi programerojn:*

https://www.tejo.org/retoso-2026/

*La vorto "RETOSO" estas  vortluda kunmeto de la Esperantaj "ret" kaj "etoso".*

**ESPERANTO - A VERDADEIRA LÍNGUA INTERNACIONAL**